FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- N° 53 - - Marto 1960 -

Redaktas G.MAMMAUX, 27 Rue Jules Ancel LE HAVRE-S.Mme

## E D I T O R I A L

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

ĈU ESPERANTO UTILOS POR MI ? .....

Tiun demandon ni ĉiutage renkontas kaj ni devas konfesi ke nia respondo restadas sur miaj lipoj ...

Kiam ESPERANTO estos venkinta la tutan mondon, tiu problemo rapide forflugos... sed, ĝis tiu trafota momento, ni devas rigardi al Idealo.

Tamen iu fakto kaptas nian atenton :
Pli kaj pli la homoj veturas eksterlanden... pli kaj pli Babel-Turo malhelpas la vojaĝontojn... la modernuloj provas interkompreniĝi PER SIGNOJ ... ( kaj, aplaŭdas la progreson!)

Ni invitas ĉiun esperanto-grupon ke ĝi uzu nian universalan lingvon en Turisma-Fako. Nia bela provinco kapablas kapti la atenton de la alilanduloj. Ekfaru propagandon PER Esperanto, invitu ilin PER Esperanto, kaj frate AKCEPTU ILIN EN NORMANDUJO PER ESPERANTO .....

Marcel BOSC
UEA-fak-delegito (Turismo)
Turisma Ordenano.

---

Ne forgesu tuj aliĝi al la Normanda Kongreso. Skribu akurate al nia amiko Gaston VERON. Li nepre bezonas sciiĝi ĉu vi partoprenos la tagmanĝon, ĉu li devas lui dormoĉambron por vi.

HOTELOJ DIVERS-KLASAJ - KAMPEJO

---

29-ème CONGRES des ESPERANTISTES DE NORMANDIE

D O M F R O N T  I4 et I5 Mai I960

---

P R O G R A M M E

Samedi I4 Mai I960

Théatre Municipal 20 h.30. Réunion publique d'Information.
Causeries de IO minutes chacune.
(Enseignement, Tourisme, Science,
Chemins de fer, Les jeunes et l'Esperanto)

- On peut se faire inscrire pour un ou deux autres sujets différents.

2I h.30. Election de la Reine I960 et de ses Demoiselles d'Honneur.

22 h.00. GRAND BAL Avec le concours d'un orchestre réputé (ambiance exceptionnelle)

Dimanche I5 Mai I960

Théatre Municipal 9 h.30. Ouverture du Congrès par M.Maurice HUET
Président des Esperantistes de Normandie
Allocution de M. Gaston VERON, Président du Comité d'Organisation.
Compte rendu moral et financier.
Compte rendu de l'activité des groupes.
(préparation à l'avance indispensable)
Lecture des décisions du précédent Congrès
Programme des activités I960
Election du Bureau
Questions diverses.

I2 h.00. Reception de Monsieur le Maire, Président d'Honneur du Congrès.

I2 h.30. Photo des congressistes.

I3 h.00. Déjeuner

I4 h.30. Visite de la Ville moyennageuse.

==========================================================

ATTENTION. Envoyez dès aujourd'hui votre adhésion à M.Gaston VERON
Place Petite Bruyère, DOMFRONT (Orne) CCP.Rouen II88-63
NF 2,50
Vous ne pouvez pas refuser votre adhésion de principe au jeune groupe de Domfront qui fait un effort considérable.

PAR AILLEURS precisez à M.VERON si vous prendrez part au déjeuner et surtout si vous désirez une chambre. Il attend votre réponse PAR RETOUR.

# N I A   V I V O

ROUEN - La Rouen-a grupo kunvenas ĉiun trian Lundon monate, de la I8-a ĝis la 20-a, 45 Rue de Buffon.
Dekon da membroj regule ĉeestas. Multaj ne povas veni pro tro fora loĝejo aŭ tro malfrua fino de la laboro.
La I5-an de Februaro, S-ro QUILLAUD, profesoro de Esperanto, parolis pri sia vojaĝo en Korfu kaj vidindaĵoj en Grekujo. Li samtempe projekciis tre belajn kolorajn fotojn. La lernantoj de S-ro QUILLAUD kaj kelkaj amikoj de la Sottevill-a grupo ĉeestis, kaj S-ro QUILLAUD estis tre vigle aplaŭdata.

LES ANDELYS - De la fino de Septembro funkcias Esperanto kurso en la elementa por-knabina lernejo laŭ la Cseh-metodo. Ĝin regule partoprenas I6 knabinoj 9 ĝis I2 jaraj. La plej lerta ricevos kiel premion senpagan restadon ĉe la infankongre-seto en Bruselo.
La lernantinoj ĵus fondis lernejan klubon, kies sidejon troviĝas en la lernejo mem. La I4 membroj de tiu klubo, jam aliĝinta al U.E.A. kunvenis por la unua fojo la 25-an de Februaro en la ludo-ĉambro de la lernejo. Post lernado de facila kanto, la du bibliotekistinoj pruntedonis Esperanto librojn legotaj hejme. La dua parto de la kunveno estis dediĉita al la preparo de teatraĵoj verkata de la infanoj mem.
De nun, la klubo kunvenos regule ĉiusemajne, merkrede, de la I6.30 ĝis la I7.30.
Por kuraĝigi la novajn klubaninojn, bonvolu sendi karton al : F-ino Josette CARON, prezidantino de la Esperanto-Klubo 8, Boulevard Nehou, LES ANDELYS (Eure).

EVREUX - La kurseto funkcias bone. Baldaŭ S-ino BELLETRE preparos la kantojn por la festo en Domfront. La grupo interŝanĝas leterojn kun grupo en Rüsselsheim, Urbo ĝemelita kun Evreux Tre interesa korespondado.

CAEN - Nia samideano MARTIN, kiu dum pluraj jaroj loĝis eksterlande estas denove en Normandujo. Tuj de sia alveno, li klopodis restarigi grupon en Caem. Li plene sukcesis, tial kvindeko da esperantistoj partoprenis kunvenon la 7-an de Februaro en "Office Municipal de la Jeunesse". Ke niaj geanoj S-ino LEVEILLEY, F-ino CHERIE, Ges-oj RAULT, S-oj LEGRET, SAPEYRAS, CHATELAIN, CHARRUEL apogas l'agadon de S-ro MARTIN, tio ne povas miri nin.
Niajn gratulojn al tiu agemaj gesamideanoj kaj longan vivon al la Caen'a grupo.

BLANGY SUR BRESLE- De post la 24-a de Novembro, kurso de U.N.E. Vic-Prezidanto Pierre POTTIER funkcias en la lernejo. 37 lernantoj de I3 ĝis I6 j. regule partoprenas.

FECAMP - Post lia reveno el Varsovio, nia amiko S-ro PERMANNE faris paroladon kaj rilatis sian vojaĝon, publike, franclingve. Tiu parolado estis antaŭe anoncita per gazetoj sub diversaj titoloj :" Mi revenas el la alia flanko de la ferkurteno" , "Mi vizitis Berlinon", "Mi revenas el orienta Eŭropo". Ĉirkaŭ dudeko da aŭskultantoj ĉeestis al tiu parolado.

"Krist-nasko sub ĉiuj latitudoj", tia estis la temo de la esperanta ekspozicio, fino de Septembro, en du urbaj magazenaj montrafenestroj. Oni kontemplis tie poŝtkartojn pri Kristnasko el ĉiuj partoj de la terglobo. Ankaŭ estis videblaj libroj, gazetoj, poŝtmarkoj, nacie kostumaj pupoj, k.t.p. La ekspozicio longe kaptis la atenton de la piedirantoj, kaj loka gazeto fotis kaj rilatis la aferon.

Tri kursoj funkcias semajne (Mardo,Merkredo, kaj Vendredo) en nova klasĉambro. Tamen oni bedaŭras la malgrandan nombron da partoprenantoj.

Dum lasta Sta Katarina festo, laborkolegoj de unu el niaj esperantistinoj oferis al ŝi vidindan ĉapelon kiu temis " Esperanto al la konkero de la Luno ".Bele aspektita, la ĉapelo restis dum pluraj tagoj en montrejo de magazeno.

Honore al la datreveno de la naskiĝo de nia Majstro, kaj omaĝe, la Grupo speciale kunvokis la amikojn de Esperanto en vespera kunveno, la I5-an de Decembro. Antaŭ granda portreto de D-ro ZAMENHOF, oni aŭskultis surbendan antologion de Li, verkitan de Prof? WARINGHIEN, kaj tradukita en francan lingvon. Malgranda poezio "Ho ! mia kor'" sekvis ankaŭ la himno "La Espero".

La 30-an de Januaro, la grupo festis la Tri Reĝojn per amika kunveno, en la kutima kursĉambro. Post ĝoja interkonversacio, oni manĝetis la platkukon tradician, kaj aŭdis kelkajn diskojn kaj kantetojn.

Pro malsano, la grupo bone malbone funkcias pri la kursoj. Tiu-ĉi jaro, eble neniu trapasos ekzamenojn de Atesto pri lernado.

LE HAVRE - La I6-an de Decembro, kunvenis dudeka da grupanoj, memore al Zamenhofa centjara datreveno. Dum tiu familia rondo, F-ino AMIARD kaj S-ro GASSE parolis pri la vivo de la Majstro Aliaj memorigis siajn internaciajn kongresojn.

La kursoj bone funkcias kun I2 gelernantoj por la elementa kurso. Pluraj komencantoj jam havas korespondantojn.

La I5-an de Januaro mortis S-ro HERBEAUX, 86 jara. Li estis la plej maljuna lernanto de S-ino LAVALLEE, ĉar li estis 82 jara kiam li eklernis esperanton,tamen je la fino de la dua jaro de lernado li sukcesis kapablecon.Ni kondolencas.

# I N F A N A Ĵ O J ( N°5 )

Broŝuroj verkitaj kaj ilustritaj de la infanoj

- Eldonejo de la moderna franca lernejo CANNES (A.M.)

-:-:-:-:-

## HISTORIO DE LA KNABETO SUR LA MONTO (Sekvo)

### AUTUNO VENAS


La herbo estas elĉerpita.
La malbona vetero baldaŭ venos.
Oni devas malsuprenigi la bovinojn al la vilaĝo por plugi kaj semi.
Ĉi-tie, la noktoj estas malvarmaj. Matene la herbejoj estas prujne blankaj.
Ofte estas necese atendi la sunon por elirigi la bovinojn el la bovinejo.
Ĉiuj belaj someraj floroj malaperis.
La monto iĝis malgaja kaj velkiga.
Vespere, revenante traserĉi la bovinojn, Justin estas tute frostita.
Oni ekbruligas fajron en la nigra fajrejo, sed la fumo pikas la okulojn.
Kelkfoje pluvas; tiam oni ankoraŭ pli malvarmiĝas.
Justin opinias, ke li pli bone ŝatus esti en la vilaĝo.

### LA REVENO AL LA VILAĜO

La neĝo venis tute proksime al l'Oriol tiu-ĉi nokte.
Matene, la montoj estis tute blankaj.
La vintro baldaŭ estos tie. Estas necese foriri. Oni amasigas sur la glitveturilo ĉion,kion oni estis alportinta por ĝin uzi somere.
Justin ekmarŝas. Li helpos Elisa konduki la bovinojn en la arbareto.
Ĉe loko, kie oni nur vidas la lignodomon de Gilbert, Justin rigardas returne.
- Adiaŭ, l'Oriol ! Adiaŭ la dometoj kun la tabulaj tegmentoj !... Adiaŭ la monto !...
Dio ! Kiom da historioj Justin devos rakonti al Francisko Ludoviko kaj Matteo, kiuj restis somere en la vilaĝo !...

F I N O

( Tradukis el la franca :S-ino VINCENT,Av. de Gaulle, LES ANDELYS)




— « Papa dit que vous n'avez pas de situation...
et que vous ne parlez même pas l'ESPERANTO. »

## NI INFORMU ILIN !

Kiam oni parolas pri Esperanto al eminentulo, okazas, kelkafoje ke la alparolanto diras :" Jes, mi scias kio estas esperanto, sed kia estas la afero ? Jam, dum mia juneco, oni parolis pri esperanto; ĉu ĝi disvastiĝis ? Ĉu ĝi estas vere vivanta ?"

Tiajn parolojn, mi ne plu volas aùdi. Tial la estraro de U.E.N. decidis eldoni, dufojojn jare, informfolion dediĉita al diver- mediaj eminentuloj. Tiel ili estos informitaj pri la vivo de Esperanto, en nia regiono, en nia lando, en la mondo.

Sed por tiu laboro, vian helpon ni bezonas. Vi konas en via urbo en via vilaĝo personojn kiuj, nepre, devas koni nian agadon : urbestro, komunuma konsilanto, sekretario de iniciativa sindikato, prezidanto de Komerca Ĉambro, instruistoj, k.t.p. Estas tiuj personoj ke ni deziras informi. Vi povos transdoni al ili la informilojn; tamen se vi ne povos, la sekretario de U.E.N. anstataùigos vin.

Estas nur provo. Estonteco diros ĉu ni pravas !


N E N I A L
P R O M E S U

viajn I4-an kaj I5-an
de Majo !

E S T A S L A
K O N G R E S O

en D O M F R O N T

Sendu tuj vian aliĝilon.




— « Assez de termes licencieux, Oscar...
Je t'ai entendu appeler la voisine : "samideanino" ! »